| | |
|---|---|
| Universala Esperanto-Asocio |  SIMPOZIO IMPONAS<br>Estrara Subteamo: MOVADO |

Estrara Komuniko EKO 2017-25 sendita el Poznano, la 22an de septembro.

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Interlingvistika simpozio plenigas grandan salonon

La 4a Interlingvistika Simpozio okazas en la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano. Por la malfermo kaj du ĉefprelegoj enpakis sin sesdeko da aŭskultantoj, tiom ke la lastaj alvenintoj luktis trovi lokon. Salutis skribe la eventon prof. Lesicki, la rektoro de UAM; alte taksis la eventon kaj la 20-jariĝon de la Interlingvistikaj Studoj persone prof. Karpinski, vicdekano de la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj. Nome de UEA angle kaj Esperante salutis ĝia vicprezidanto. Prezidis la estro de la interlingvistika fako, prof. Ilona Koutny.

Sekvis anglalingva prelego de prof. Humphrey Tonkin de la Universitato de Hartford '*Esperanto: A Language Policy Assessment'* (Esperanto: Lingvo-Politika Pritakso). Koncize, temis pri la ecoj de Esperanto; li elstarigis la gravecon kaj de la korpuso (vortotrezoro kaj gramatiko) kaj la statuso (kiu devenas parte el la parolkomunumo). La simpozio okazas trilingve, en la publiko estis signifa kvanto de neesperantistoj aŭ pasivaj posedantoj de la lingvo – sekve la simpozio havis laŭdindan aleksteran karakteron. Eĉ la esperantistoj, parte studentoj de la nova kaj malnova grupo de la trijara studprogramo, kies ĉeesta sesio okazis ĝuste nun, estis akute multnaciaj (el 15 landoj). La dua inaŭgura prelego venis de Véra Barandovská-Frank pri 'Koncepto de la studobjekto Interlingvistiko", kiu amplekse pruvis, ke la temo estas nenie adekvate difinita kaj povas enhavi preskaŭ ion ajn. Ŝi prezentis proveldonon de sia lernolibro pri interlingvistiko pretigitan por la Interlingvistikaj Studoj.





En la dua simpozia tago, la plensesiaj prelegoj estos prezentitaj de Ilona Koutny (20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj de UAM) kaj Sabine Fiedler (Esperanto – ĉu lingvo por ludado kaj ŝercado?) La cetero de la programo disvolviĝas en du aŭ tri apartaj fadenoj, por enpreni konsterne varian kaj multnacian aron da prelegantoj kaj temoj.

SMG/IK

Fotoj: SMG. Sube: parto de la simpozia publiko.



## Ne nur simpozio en Poznano

La Ekzamena Komisiono de UEA havis plurhoran kunsidon en Poznan, la 20an de septembro. Partoprenis ĝin la tri komisianoj, Katalin Kováts, Renato Corsetti kaj Zsófia Kórody, plie Stefan MacGill flanke de UEA kaj Humphrey Tonkin, reprezentanto de ESF.
La ĉefa temo de la kunsido estis konfirmi la pluan kunlaboron de la komisionanoj en la antaŭa konsisto, trakti KER-regularon, prezentotan al la estraro de UEA, taksi la pasintajn 9 jarojn kaj fari planon por la venonta la periodo. La komisiono pritraktis ankaŭ la rilaton kun la budapeŝta ekzamena centro ORIGO kaj membrecon de UEA ĉe Asocio de Lingvotestitoj ĉe Eŭropo (ALTE). Detala raporto pri la kunsido estos publikigita baldaŭ.

KK nome de la komisiono

## Vojaĝhelpilo por oraĝuloj – ni kune verku ĝin!

Ĉiu scias, ke esperantistoj estas vojaĝemaj. Ne ĉiuj povas facile, sed la emo certe estas. Ĉiu scias, ke esperantistoj vivas pli longe – nu, ni konfesu, iu ajn alloga hobio aŭ pasio (krom ekstremsportaj) tendencas iomete longigi la vivon. El tiu du konstatoj, ni povas konkludi, ke UEA povus tre utile arigi vojaĝkonsilojn por pensiuloj kaj oraĝuloj. En unu alkroĉaĵo, vi trovos komencan provon pri tio. Ĝi en iom leĝera stilo povas konigi iujn eblojn por kelkaj landoj. La teksto estas nekompleta kaj prova. Ĝis nun ĝi disiris nur al elektitaj personoj por komentoj, i.a. IFEF. Ĝi estis verkita antaŭ du jaroj – se ĝi ne disiros nun, ĝi riskas neniam disiri. La kunverka parto de la projekto – sendu al mi informojn pri pliaj landoj, korektojn aŭ kompletigojn pri ekzistantaj. Ni helpu unu la alian!

SMG

Vortoj: 600

==============================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe:http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonemuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.